EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 45>** ● Kurieroj ● Forumoj ● Usono ● Azio ● ALTE **< aŭgusto 16**

# Kuriero pri migrado

La decembra numero de la Kuriero de Unesko havas ĉeftemon 'Rakontoj de Migradoj.'




Ĝi raportas, ke en 2019 estis 272 milionoj da migrintoj, tio estas 3,5% el la suma monda loĝantaro. La migrintoj venis ĉefe el Barato, Meksiko kaj Ĉinio. Aperas raportoj el Niĝerio kaj Peruo, krome de sorbolandoj Kanado kaj Francio pri helpaj programoj. Alia artikolo emfazas la gravecon de kroz-telefonoj por migrantoj por akiri informojn kaj teni kontakton kun siaj familianoj.

Aliaj artikoloj en la numero diskutas la gravecon de malferma scienco kaj la danĝerojn por ĵurnalistoj.

Ĉi tie ni agnosku la valoron kaj grandan laboroj de la tradukistoj de la artikoloj al Esperanto!

La numero (kaj aliaj) estas elŝuteblaj el la retejo de UEA ('Revuoj'), kiu tamen plusendas vin al la retejo de Unesko,  por ke ili kalkulu la nombron da elŝutoj. Elŝutu ĝin nun por kontribui al la elŝutado kaj krome riĉiĝi spirite!

Jen la kovrila bildo de la posta, plej freŝa numero, tiu de 2022/1.

## La komitataj forumoj agis en la UK

La kvar raportoj de Komitataj Forumoj estas entekigitaj en la retejo de UEA..

- Konsciigo
- Kapabligo
- Komunumo
- Kunordigo


https://uea.org/teko/komitato

Ĉi-jare la Komitataj Forumoj laboris, kadre de la Strategia Laborplanado de UEA,

pri verkado de strategiaj laborplaneroj rilate al la 4 agadkolumnoj. Por ĉiu el la 4 K-temoj la partoprenantoj skizis kaj Strategiajn Prioritatojn kaj Konkretajn agojn.

Dankon al la partoprenantoj kaj apartan dankegon al la reĝisoro de la Komitataj Forumoj kaj al la helpantoj.

Aleks Kadar, sekretario de UEA




## AMO 91 en Togolando – horoj, subtemoj

La seminario okazos de la 26-a de aŭgusto ĝis la 30-a. La seminarion oni povas sekvi ĉeeste ankaŭ per interreto en la 29a de aŭgusto.. La ĉefa temo de la seminario estas « Esperanto kaj trejnflegado) »

L aĝisnunaj subtemoj estas

i- Vegetarismo/vegetalismo/veganismo
ii- Ĉiismo, la pluriversa koncepto
iii- La tabelo kun tabelvortoj ne aperintaj
iv- Esperanto kaj la angla, du internaciaj lingvoj
v- Vivejo (Lernejo de la vivo)
vi- Laborkontrakto
vii- Afrika agado kaj agado de UEA en Afriko
viii- Doktoriĝo : ĉu afero por superhomoj ?
ix- Esperanto-ekzamenoj
x- Kiel verki kaj eldoni librojn (redakti)
xi- La ĉefaj tri 'nuoj' (gravaj bezonoj de la homo)

## Usona progreso en filma formo

Malgraŭ tio, ke la Jarraporto de Esperanto USA aperos en nia retejo

(www.esperanto-usa.org),
Jen filmeto pri kelkaj punktoj pri la movado en Usono.

https://www.youtube.com/watch?v=MEJh7kWMaP8

Mallonge, ni estas pli aktivaj ol antaŭe.  Ni ne perdis monon nek membrojn en 2021.  Male, ni gajnis  $3137 USD en 2021.

Phil Dorcas, prezidanto, Esperanto USA (ELNA / Esperanto Ligo por Norda Ameriko)
filipo@grupoj.org

## Pli da informoj el Greziljono

Ne restu hejme en aŭgusto. Profitu eventon en la franca kastelo Greziljono, de la 16a ĝis 25a de aŭgusto. La vetero belos: suno kaj malpli ol 30 °C  (gresillon.org/vetero)
La sanitara situacio bonas: Kovimo klare malpliiĝis. (covidtracker.fr)
Niaj prezoj ne ŝanĝiĝis kaj duona tarifo eblas por tiu kiu bezonas. (gresillon.org/tarifoj). Eblas tranokto en kastela lito aŭ en via tendo.
Menuo vianda aŭ vegetara. Infanoj aparte bonvenas!

**Aktivaĵoj variaj por granduloj kaj malgranduloj:**

-- Esp-kurso kaj kantado de kanzonoj kun Jean-Luc
- Esp-kurso kaj fotoprelego pri Ukrainujo kun Svetlana
- Mazi-kurso per desegnofilmo kaj manlaboroj kun Nicky
- popolaj dancoj kun Noëmie
- origamia paperfaldado kun Larisa
- japana abako kaj filmetoj kun Alain
- ĝardenumado kaj pentrado kun Nathalie
- -- banado, vizito de vilaĝa festo kaj aliaj amuzaj aktivaĵoj kun Bert.
- meditado kun Xavier




informoj: gresillon.org/s4;
aliĝo: gresillon.org/aligho
kontakto: kastelo@gresillon.org, +33 - 241 891 034 (respondilo)

BONVENON en via Esperanto-kastelo

## La Azia Kongreso invitas vin!

Tio okazos inter la 3–a kaj la 6-a de novembro, 2022 en la korea urbo Busan.

Bone estas vidi, ke la kontinentaj kongresoj revivigas sin. En baldaŭa EKO ni raportos pri la 8-a Afrika Kongreso en Tieso, Senegalo, kiu okazos en decembro 2022.

## La kungfua kunikleto atakas refoje

Maximiliano GARCIA estas hispandevena svisa inĝeniero kaj komercisto. Kiel poligloto li parolas ok lingvojn kaj estas filmprodukitsto de la animaciaj filmoj kaj libroj “Savu la Planedon kun Kungfua Kunikleto!” Li reprezentis la Ligon ILEI ĉe UNESKO en Parizo en 2021.

Kungfua Kunikleto:
https://www.youtube.com/watch?v=f2gDC5VXhJg&ab_channel=Esperanto%2BEdukadoILEI

Fonto: programplano de VEKI-3: https://www.espero.ir/eo/veki-3/

## Kursoj francaj ĉiusabate

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Sabataj kursoj: Espéranto-Vendée
Gvidantonomo: Victor COUTURIER
Tipo: Nova movada kurso
Loko: La Roche sur Yon, Francio
Aldoninto: gravuristo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27434

## ALTE Tenu la standardon!

La konferenco de ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo), okazonta en novembro estos parte hibrida, do reta kaj ĉeesta.

La temo estas tre konvena 'La malplej parolataj lingvoj el la vidpunkto de plurlingveco'.

https://www.alte.org/event-4685276

Por UEA planas la partoprenon la kutima reprezentanto, s-ino Zsófia Kóródy.

========= vortoj: 780 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.